

# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale  
PLENUMITA 25/11/2021 Kvincentkvindekoka eldono (unua eldono 20/09/2011)



### Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer [rogerspringer@tpg.com.au](mailto:rogerspringer@tpg.com.au);

**Uzindaj ligoj** [Google Translate](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Freelang Vortaro](#)  
[lingvohelpilo](#) [PMEGramatiko](#) [Esperanta Retradio](#) [Plena Analiza Gramatiko](#)  
[Pasintaj AE eldonoj](#) [Esperanta himno](#) [duolingo entute](#) [openclipart.](#)

Forĵetu viajn vortarojn. Uzu [Google Translate](#) kiel vortaron

Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingebblas je la suba adreso

[Ctrl+klaku la veran ligilon\) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo](http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo)

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

Entute **805,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **285,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **222,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **191,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas **107,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020)

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde aprilo 2022)

## Surhavu vizaĝmaskon.

Roger Springer

Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.

Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn.



La [Esperanta Retradio](#) donas bonan ĉirkaŭ-5- minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.



[Esperanta Retradio](#) [Dulingveco](#) 19/11/2021

## Mi serĉis la interreton por kontraŭ militaj Aŭstraliaj politikaj partioj.

Australian Citizens Party [View Email in Browser \(enudgemail.com.au\)](mailto:enudgemail.com.au)

The Socialist Equality Party, SEP La nunaj politikistoj nur helpas Usonajn militojn.

Green Party Eble? sed ili ne tiel klare esprimas sian kontraŭon **Roger Springer**

**Kontraŭ milito.** Laŭ mi, ĉi foje, la plej grava voĉdona promeso de la politikistoj por gajni vian voĉdonon estas ne plua partopreno en fremdaj militoj.



## La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas je 10.30 atm ĝis 12tm je la unua kaj tria sabatoj de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.

Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno.

La 20a de novembro estis la tria sabato. Venis Chris kaj Roger **Roger Springer**

## Kial la homa raso malkreskas? Vidu AE556

### Respondo al la artikoloj de Roger S. kaj demandoj de Terry Manley pri "Mondpopolano"



Laŭ mi preskaŭ ĉiaj problemoj en nia mondo, ĉu

Klimatŝanĝo, Militoj, Malsatego ktp, baziĝas ĉe la fakto ke estas **tro da ni** en la mondo.

Ne, ni certe NE bezonas pli da homoj, ĉar ĉiuj kompreneble volas havi la saman viv-nivelon kiel ni en la Okcidenta mondo kaj tio daŭre detruos la planedon.

En Aŭstralio la registaro diras ke la ekonomio pliboniĝos se estos pli da homoj do ili kuraĝigas paroĵn havi pli da infanoj.

*Kia terura pens-maniero!* Jes, en Aŭstralio ni eble bezonos pli da homoj, sed pensu pri la pli-malpli 10 milionoj da Rifuĝintoj en la mondo- kial ne enlasi ilin en la lando? La rifuĝintoj ĝuos pli bonan vivon kaj nia ekonomio kreskos *sen pligrandigi la mondpopolon!*

Tio estas gajna/gajna situacio!

Mi petas - NE pli da homoj, jam pli ol sufiĉas!!

**Indrani Beharrylall**



## NIA SUBTENO AL MONDO MILITEMA

Antaŭ 6 jaroj la aŭstralia registaro decidis pligrandigi ties vendon de armiloj tra la mondo por enspezi monon.

La celo estas ke Aŭstralio estu unu el la deko de plej sukcesaj nacioj kiuj eksportas armilojn.

La eksportoj nun estas pri partoj por armiloj- aviadiloj, ŝipoj, tankoj, radarsistemoj k.s.

En 2017-2018 la eksportoj valoris \$1.5 miliardojn. En 2019-2020 la valoro estis \$5.5 miliardoj -preskaŭ kvaroble. Sed Aŭstralio ne ankoraŭ atingis la celon.

La registaro ne informas al kiuj nacioj ĝi vendas armilojn. Estis nur per la rajto informiĝi ke ĵurnalistoj konstatis ke multaj armiloj iras al afrikaj nacioj kaj al arabaj nacioj. La UN rekomendis ke nacioj ne vendu armilojn al iuj el tiuj nacioj pro ties nestabileco, sed eksportoj daŭras.



**Terry Manley**

## JOHN W. ADAMS (1933- 2021)



Entuziasmulo pri Gordon, muzikisto, historiisto kaj esperantisto.

Ni volas plenkore omaĝi nian esperantan amikon John Wield Adams, kiu bedaŭrinde mortis je la 26a de Oktobro 2021 en Torquay,

Viktorio. Post dungado en banka sektoro, ĉefe en Melburno dum 40 jaroj, John kaj lia edzino Elrae translokiĝis al la maro-urbeto, Torquay, kaj iĝis ĉampionoj de artaj agadoj dum la sekvaj 20 jaroj inkluzive Esperanto-movadon.

John estis konata kiel muzikisto kaj penis kiel sekretario de la Adam Lindsay Gordon Memoriga Komitato, (*la Adam Lindsay Gordon Commemorative Committee*) eldonante ilian retan bultenon "*The Wayfarer*" ekde 2007. Ĉiun jaron je la "*Froth and Bubble Day*," la membroj celebris Gordon kaj legis poemojn de Gordon antaŭ lia statuo en Spring Strato, Melburno, kun flavaj floroj de akacio, bobeloj de "cappuccinoj," kaj infanoj blovantaj bobelojn.

Samtempe, John kaj Elrae komencis lerni Esperanton por stimuli siajn cerbojn dum la emeritiĝo. En 2009 John kaj esperantisto Miranda Lutz iniciatis teatraĵon nomita AQUA, kune kun iu loka cirka trupo. Lernantoj turnis fajrajn bastonojn dum Miranda parolis kiel Diino de la Luno en Esperanta lingvo. Ĝi estis parto de la Alta Tajdo Festivalo kiun la *SurfCoast* loka registaro sponsoris. Grupo de 15 plus esperantistoj, portantaj flagojn kun Esperanto verda stelo, marŝis en la Alta Tajda parado tra la Esplanado al la ĉefstrato de Torquay.

En 2010, John kaj Elrae tiam iniciatis "*Froth & Bubble Arts Festival*", kiu akiris stipendion de la loka registaro. La sukcesa festivalo laboris kune kun lokaj verkistoj, kaj aliaj kulturaj organizoj. Prezentaĵoj en Esperanto estis parto de la programo.

John kaj alia kunfondinto de Adam Lindsay Gordon societo (ALGS,) Travis Seller, publikigis la Enciklopedion de Adam Lindsay Gordon (ALG) en Februaro 2019. La eldonon de la libro John preparis kiel "*PowerPoint*" prezentaĵon kiun en Marto kadre de la virtualaj monataj prelegoj de AEA la Torquay membroj prezentis en 2020.

John estas postvivita de sia edzino Elrae, kvar infanoj, 7 genepoj kaj 6 pragenepoj. Ilia humanisma laboro estos transprenata de Esperanto Komunumo kaj de la ALG Asocio. Lia animo ripozu en Paco. Ni tre sopiras lin.

Sincere, Gary kaj Marumi (Melburnaj Membroj)

**Gary & Marumi Smith**



**Artikoloj por AE.** Se vi trovas taŭgan artikolon por AE kaj ne fidus vian Esperantan nivelon, uzu la aŭtomatan tradukilon de Guglo kaj sendu ĝin rekte al AE [rogerspringer@tpg.com.au](mailto:rogerspringer@tpg.com.au);

## Problemoj kun Guglaj tradukoj

Kiel Roger sciigas en ĉiu numero de Aŭstraliaj Esperantistoj, la tradukoj de Guglo alportas grandan helpon al tiuj, kiuj ne fidis sian konon de la lingvo. Ĝi kontentige funkcias por traduki de iu eŭropa lingvo al alia, sed la traduko de azia lingvo kiel la korea al la angla estas mirinda. Jen ekzemplo:

*A blue-eyed man planted a national army tree on the leg of a leg. They gave a long stem to show off each other's flowers.*

*The high-ranking country always holds a bouquet of flowers and stretches their own legs.*

Mi ŝatus kompreni kial Guglo ne povas doni eĉ ideon pri la temo de la teksto, kiun ĝi tradukas. Ĉu pro la malsama maniero krei vortojn kaj strukturojn? Kial estas tiom da ripetadoj ekzemple "la lando de la lando de la lando." Se mi aldonus ke akompanas la tekston, kiun mi citis, bildoj de floroj, ĉu tio helpus? **Franciska Toubale**

## La uzo de Duolingo kun Gugla traduko por studi la Ĉinan.

Kiam mi trovas ke la ĉina frazo estas tro rapida por miaj oreloj, mi kopias ĝin kaj tradukas per gugla traduko. Guglo parolas la frazon je ¾ de la rapideco kaj ankaŭ eblas eltiri unuope la karakterojn 特点 por la traduko.

Mi mem ne trovis grandajn problemojn pri la traduko de la ĉina. Sed kiel homo, pli inteligenta ol maŝino, mi devas esti iom zorgema pri la traduko. **Roger Springer**



Mia nepino, 27 aĝa, enmalsanulejiĝis pro reago al la "sanprotektita" vakcinado.

**Roger Springer**


**(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)**

## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER"

(de Mason Stuttard). N.ro 62 de "Por Komencantoj".

GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

- 1). Ĉu en la sekva frazo la vorto "manĝintaj" estas epiteto: "homoj kiuj estas manĝintaj".
- 2). Ĉu en la sekva frazo la vorto "konota" estas epiteto: "la fiŝo kies gusto ankoraŭ ne estas konota".
- 3). Ĉu la suborda frazo normale antaŭas aŭ sekvas la antecedenton?
- 4). En la frazo "la seĝo sur kiu kuŝas la kato", kiu vorto estas la relativa pronomo, kaj kiun antecedenton ĝi determinas, difinas?
- 5). En la frazo en Demando 4, kiun funkcion havas la vorto "sur"?



Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 558.

**Marcel Leereveld.**

## 3ZZZ

La elsendo de la 22a de novembro 2021 enhavas raporton pri la situacio de la rifuĝintoj je la landlimo inter Pollando kaj Belorusio, leteron de Zamenhof, gravan por la estonto de la lingvo, kaj amuzan leteron de Laimundas Abromas, kaj invitas la aŭskultantojn al vojaĝo. Informas **Franciska Toubale**



